



6(151)
2014

Apudvistula Bulteno

de Krakova Societo ESPERANTO

Bultenon redaktas: ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO,
Adreso por korespondi: str. Sokolska 13, 31-515 KRAKÓW

Kálmán Kalocsay

Familiopatro

La am' ebria iĝis edzodevoj.
Edzin' – feino ĉe la enamiĝo –
Dikiĝis, grumblas hirte, en negliĝo,
De ŝia kapo falis kron' de revoj.

Junulaj sonĝoj estis trompimagoj.
Kaj restis: zorg' pri vesto kaj pri pano,
Laceco, tremo dum infanmalsano,
Treniĝo sub la ŝarg' de grizaj tagoj.

Ho, kaptas ofte lin dezir' ribela:
Elsvingi el la jugo sian nukon,
Ekiri al la vivo dande bela!

Sed devoj vokas, baras al li flugon,
Ĉenite firme al la rad' muela
Li klinas kapon sub benitan jugon.

Maljuna fraŭlo

Vesperoj gaje pasas en kazino,
La glasoj tintas, li la fumon blovas.
Promene li ĉapelon flankenŝovas
Kaj dande turnas sin post belulino.

Senzorge, gaje li tra l' viv' promenas
Edzina plendo, aro de infanoj,
Kun bruaj ludoj, ploroj kaj malsanoj,
Per hejmaj zorgoj lin neniam ĝenas.

Sed ofte, se el amikfamilio
Li venas, jen, eksangas, kvazaŭ vundo,
En lia koro akra nostalgio

Je l'hejm', kiun sur sia vivogrundo
Li ne konstruis. Kaj kun apatio
Li ĝemas: „Morti sola, kvazaŭ hundo!”
el „Streĉita kordo”

KÁLMÁN KALOCSAY (1891-1976) hungaro, kuracisto, docento pri infektaj malsanoj, ĉefredaktoro de „Literatura Mondo”, elstara aŭ eĉ plej granda esperanta poeto. Esperantisto ekde 1913, en Esperanto-movado li prelegis, deklamis kaj aktoris. Li scipovis pianludi kaj komponi. Inter multegaj verkoj oni precipe alte taksas jenajn

a) originale verkitajn: Mondo kaj koro (poemoj 1921), Streĉita kordo (poemoj 1931), Rimportretoj (humuraj poemoj 1931), Lingvo, stilo, formo (studoj 1931), Parnasa gvidlibro (kun G. Waringhien 1932), Sekretaj sonetoj (sub pseŭdonomo Peter Peneter 1932), Izolo (poemoj pretaj en 1939, eldonitaj en 1977)

b) tradukaĵojn: Kantanta kamparo (popolkantoj 1923), La tragedio de l' homo (I. Madách, drama poemo 1924), Tri dramoj de Ŝekspiro, La tempesto 1963, Reĝo Lear 1966, Somermeznokta sonĝo 1967), Tutmonda Sonoro (poemoj tradukitaj el 30 lingvoj 1981).

La vorta eltrovemo, majstrado super la lingvo ne alkondukis lin al ia brila, senenhava verstekniko. Apogita de tre forta humanista kulturo lia penso ampleksas ĉiujn temojn. La klasika koncizo kaj intelekta kapablo egaligas la esperantan poezion kun la alilingvaj. La aŭtoro preferis tradiciajn formojn de poezio, do ambaŭ fiksitaĵe supre poemoj havas formon de soneto.

Amu Poznanon, amu Arkones-on!

Pri kio pensas poloj, se ili aŭdas: Poznano? Eble pri tieaj vidindaĵoj? Eble pri famuloj el tiu urbo? Mi ne scias. Sed por esperantistoj la nomo Poznano certe ligiĝas kun la Interlingvistikaj Studoj ĉe Adam Mickiewicz-Universitato kaj, kompreneble, kun Arkones – Artaj Konfrontoj en Esperanto, sendependa kaj grandskala manifestacio de Esperanto-kulturo.

Ĉi-jare la aranĝo daŭris de la 26-a ĝis la 28-a de septembro. Por la jubilea, 30-a Arkones, varbiĝis entute 204 partoprenantojn el 24 landoj. Kiel kutime, plej multaj estis poloj kaj germanoj, sed venis ankaŭ inter alie brazilanoj kaj rusoj. Ne gravis tamen ĉu oni venis el Pollando aŭ el Aŭstralio, ĉu oni junas aŭ aĝas multe, nek ĉu oni estas spertulo (aŭ eĉ stelulo!) en Esperantujo, aŭ nur komencas sian aventuron kun la movado kaj kulturo – ĉiu senescepte povis senti la unikan etoson de Arkones.

Kiel kutime, la programo plenplenis je interesaj kaj diversaj eroj. Ilia kvanto – ĉirkaŭ kvardek – malebligis al la ĉeestantoj partopreni ĉiujn: simple, okazadis ĝis tri samtempe. Foje tio kaŭzis grandajn dilemojn: kiun elekti? (aŭ eĉ: ĉu partopreni interesan prelegon aŭ tagmanĝi?). Sendepende de la elekto, mi pensas ke ĉiu kontentis pri la aranĝo.

Ŝatantoj de tiel nomataj seriozaj temoj certe ĝuis prelegon pri la lingvopolitiko de Eŭropa Unio, gvidatan de István Ertl. Aŭ eble tiun pri Tibor Sekelj de Tomasz Chmielik. Lingvo-reformuloj kaj iliaj kontraŭantoj sendube interesiĝis pri la programero de Johan Derks, kiu prezentis kvar ideojn por solvi la io-ujo-konflikton. Kiu ŝatas okupiĝi pri la movado, tiu ŝajne partoprenis ankaŭ la prelegon de Barbara Pietrzak titolitan *Montevideo 60* aŭ *Pola Studenta Esperanto-Komitato sen mitoj* de Jarek Parzyszek. Ĉi-jara Arkones estis granda festo ankaŭ por tiuj, kiuj fasciniĝas pri la orientaziaj landoj kaj kulturoj, ĉar Roman Dobrzyński prezentis sian novan filmon *Bonvenon al Nepalo*. Sed ŝajne la plej grandan atenton altiris prezentaĵo pri arta aktivado de Oomoto. Kun ĝi estis ligita ekspozicio de kvar pendaĵoj kaj du tebovloj de la sinsekvaj Oomoto-gvidantoj – estis tre unika ŝanco vidi ilin, ĉar lastfoje ilin oni eksponis en Eŭropo antaŭ 40 jaroj!

Sed ja Arkones estas ankaŭ bonega ŝanco por diskuti! Okazis ekzemple paneldiskuto pri seksismo en Esperantujo – ĝiaj partoprenantoj konstatis (tamen ne unuanime!), ke seksismo efektive ekzistas tie kaj revuoj, kiel ekzemple „Femina” estas bezonataj. Alian temon traktis neformala diskutrondo gvidata de la skipo de la blogo „Egalecen” – nome *GLAT-movadon*. Kiel montriĝis, la diskutoj estis sendube sukcesaj programeroj.

Se estas Arkones, estas ankaŭ koncertoj – ĉi-jare aparte ĝuindaj. Prezentiĝis do Zuzanna Kornicka kun siaj ĉarma voĉo kaj ĉarma filino, Kajto kun siaj kantigaj kanzonoj kaj ankaŭ la duopo Birke kaj Bertilo. Mi ege ĝojis pro la ĵazkoncerto de Melono, kiu prezentis konatajn kaj ankoraŭ nekonatajn muzikpecojn, kaŭzante grandan aplaŭdon kaj fortajn emociojn.

Apud la oficiala programo ekzistas tamen ankaŭ la neformala – kiel iu anonimulo diris „subtera programo”. Hazardaj aŭ antaŭfiksitaj renkontiĝoj, diskutoj en koridoroj, intervjuoj kaj ankaŭ simpla amikumado – ĉi ĉio montras, ke vere Esperanto estas viva lingvo, uzata ne nur por sciencaj kaj kulturaj debatoj, sed ankaŭ por distro kaj amuzo. Tial, laŭ mi, la neformala parto de la aranĝo estas same grava kiel la oficiala – ĉar kio estas pli bona manifestacio de Esperanto-kulturo ol homoj de kvin naciecoj sidantaj pace ĉirkaŭ unu tablo, drinkantaj vinon kaj simple festantaj, en plena interkompreniĝo, malgraŭ ĉiaj politikaj aŭ naciecaj dividoj?

Resumante, la 30-a Arkones estis denove partopreninda. Mi pensas, ke neniu lasis Poznanon malkontenta – kaj se jes, tiun senton kaŭzis nur la fino de la aranĝo. Bedaŭru ĉiu, kiu ne partoprenis – nur tion mi povas diri. Kaj ĝis revido ĉe la 31-a Arkones, inter la 25-a kaj la 27-a de septembro 2015!

Tobiasz Kubisiowski

Lidia Ligeza

Collegium Maius de la Jagelona Universitato en Krakovo

Komenco de la konstruaĵo de la nuna Collegium Maius en Krakovo estas tre interesa. Tuj post fondigo de la Krakova Akademio en 1364 j. oni probable lekciis en ejoj de la reĝa kastelo sur Vavelo. Poste reĝo Kazimiro la Granda planis masoni sidejon por ĉi altlernejo. Bedaŭrinde neaten-dita morto de ĉi tiu reganto en 1370 j. forstrekis ĉi noblan intencon. Do historio de la universitataj domegoj komenciĝas ĵus en unuaj jaroj de la XV-a jarcento, kiam laŭ testamento de la reĝino Hed-viga reĝo Ladislao Jagelo renovigis la kazimiran fondaĵon. Por reaktivigi agadon de la universitato oni aĉetis de la familio Peçherz el vilaĝo Rzeszotary domon situitan en angulo de stratoj Jagielloń-ska kaj al Sankta Anna, masonitan el romp-ŝtono kun granda salono suretaĝe. En ĉi granda domego, kiu povis esti restaĵo post la juda sinagogo oni solene komencis la universitatan lekciadon la 26-an de julio en 1400 jaro. Dum la tuta jarcento profesoroj de la altlernejo alaĉetadis al la baza domo la naj-barajn konstruaĵojn, kiuj en 1468 j. estis ligitaj en unu tuton per masonita ĉe Jagiellońska-strato orna-mita orielo. La komplekso forbruliĝis en incendio en la j. 1492. Baldaŭ komenciĝis la bazaj rekon-struaj laboroj. Karlo Estreicher opinias, ke arkitekturo de la nova Collegium estas apogita je la italaj modeloj, ĉefe je arto de Leo Battista Alberti. La italaj arkitektoj partoprenis en konstruo de la krako-va Collegium Maius, kvankam ĉefa majstro estis Johano el Kolonjo. Fine de la XV-a jarc. ekestis la monumenta domego, kies centron konstituas kortego havanta malfru-gotikajn, kristalajn volbojn. Komence de la XVI-a jarc. majstro Marko trakonstruis aŭlon, eksan Teologian Lekciejon kaj dum jaroj 1515-1519 majstro Benedikto alkonstruis de la suda flanko la vastan bibliotekon kun la rene-sancaj fenestroj.

En Collegium Maius teretaĝe troviĝis lekciejoj kaj etaĝe Stuba Communis (la Komuna Man-ĝejo), biblioteko kaj loĝejoj por profesoroj. En angulo de la stratoj al Sankta Anna kaj Jagiellońska oni lokigis Teologian Lekciejon, aŭ la nunan aŭlon, kies grandaj fru-renesancaj fenestroj kreas ĉefan arkitekturan akcenton. Ĉi staton la kolegio konservis ĝis la XIX-a jarcento. Ĵus en 1819 j. oni komencis la multjaran renovigon, kiun en jaroj 1839-1856 gvidis arkitekto Karlo Kremer, admiranto de la novgotika stilo. Post lia morto la laboron kontinuigis la aŭstra arkitekto Hermano Bergmann ĉe la kunpartopreno de Felikso Księżarski. Rezulte de tiuj arkitektaj agoj Collegium Maius ricevis nov-gotikan aspekton kaj provizon de la eno. En ĝi trovis la sidejon Jagelona Biblioteko. Ĉi la plej mal-nova pola libraro okupis tiun lokon ĝis 1940 j., kiam translokiĝis al novkonstruita sidejo ĉe Aleo al Mickiewicz. En la jaro 1945 oni komencis la renovigajn laborojn ĉe la kolegio, kiuj daŭris ĝis 1964 j. Estris al tiu agado prof. Karlo Estreicher, kaj planojn de la trakonstruo faris Alfredo Majewski. Oni forigis nov-gotikaĵojn kaj preskaŭ restituis al la konstruaĵo la primaran formon de la XV-a kaj XVI-a jarcentoj. En ĝia eno oni aranĝis Muzeon de la Jagelona Universitato.

Collegium Maius (kun adreso Jagiellońska-str. 15) estas situita sur la malnova loko. Ĝia fa-sado etendiĝas laŭ strato Jagiellońska; la plej okulfrapaj ĝiaj elementoj estas altaj fenestroj de la aŭlo, bela orielo de Stuba Communis kaj gotikaj pintoj sur brikaj muroj, kiuj enhavas tie kaj alie fragmen-tojn el neĉizita ŝtono.

Trans la gotika portalo oni eniras al la impona kortego ĉirkaŭita per arkadoj. En suda angulo ritmon de arkadoj ĉesas monumenta ŝtuparo kondukanta al galerio de la etaĝo situita sur muroj de la kortego. Enirejo de la galerio al la suda alo nomiĝas Porta Aurea (La Ora Pordego) pro la ora kadra-ĵo, unu el la plej ornamaj en Krakovo dank' al arko en formo de la "azena dorso" komponita el ŝraŭ-be kunvolvitaĵ, dikaj foliaj trunkoj finitaj per aĵura finialo. Pli supre ni vidas la fond-tabulon de la

studenta domo Jerosalemo, kiun fondis en 1454 j. kardinalo Zbignevo Oleśnicki. La nekonata artisto fiksis sur la tabulo lian portreton kaj modelon de ĉi konstruaĵo. Super alirejo al eksa biblioteko troviĝas interesa ludanta horloĝo. Ĝi devenas de antaŭ 1465 j. En diversaj tempoj ĝi agis aŭ estis difektita. Nuna ĝia versio de 2000 jaro estas la kvara, farita apoge je komputilo, helpe de kiu moviĝas la figuretoj kaj aŭdeblas du melodioj, fragmento de kortega muziko kaj universitata himno Gaudeamus igitur. La figuretoj prezentas personojn ligitajn kun la universitato, i.a reĝan paron Hedvigan kaj Ladislaon Jagelo, rektorajn sanktan Johanon el Kęty kaj Stanislaon el Skalbmierz. La mekanismo agas ĉiun duan horon de 9-a ĝis 17-a h.

Meze de la placeto troviĝas la renesanca puto restarigita post la lasta renovigo.

En Collegium Maius suretaĝe – en eksaj lekcioj – nune oni fiksis malnovajn aparatojn kaj arojn de strangaĵoj kun la alkemia salono surfronte. Suretaĝe troviĝas parto de la universitata Muzeo destinita por viziti. Kolektoj de ĝi estas ligitaj kun historio de la Jagelona Universitato kaj certaj devenas eĉ de XV-a jarĉ. La viziton oni komencas de Librejo atingebla trans Porta Aurea. Ĉi tie oni aranĝas kunsidojn de la universitata senato kaj en la najbara Stuba Communis kunvenadas profesoroj ankaŭ por elekti rektoron. Ĉi salono havas valoran, barokan, gdansk-stilan ŝtuparon translokitan el Potocki-palaco en Krzeszowice. Apude troviĝas eksaj profesoriaj loĝejoj, en kiuj oni konservas i.a. gotikajn universitatajn sceprojn, donacojn de reĝino Hedviga kaj de kardinaloj Zbignevo Oleśnicki kaj Frederiko Jagelonido. La admirataj objektoj estas ankaŭ la ora globuso, nomata jagelona, fingroringoj kaj mezepoka ĉeno de princino Aleksandra. Ne nur fakulojn fascinas kolekto de astronomiaj iloj donacita al la altlernejo de Marteno Bylica en 1492 j. kaj netaksebla, araba astrolabo de 1054 j. La lasta destinita por viziti salono estas aŭlo; sur ĝiaj vandoj pendas portretoj de reĝoj, bonfarantoj, kaj profesoroj de Almae Matris. Ĉi tie sur friso de la portalo ni legas la sentencon, ĝis nun devizon de la Jagelona Universitato: *Plus ratio quam vis* (Pli signifas racio ol forto).

En la dua parto de Collegium Maius troviĝas lokaloj kun malnovaj iloj fizikaj kaj kemiaj kaj ankaŭ impona kolekto de globusoj ĉielaj kaj teraj i.a. famaj globusoj de Mercator el XVI-a jarcento. Muzeo posedas ankaŭ aparataron, helpe de kiu Karlo Olszewski kaj Sigismondo Wróblewski en 1883 j., kiel unuaj el la mondo, efektivigis statikan likvigon de la aero kaj ties komponantoj. Donaco de Ksavero Pusłowski por la muzeo konsistas el valoraj bildoj de Johano Matejko kaj Eŭgeno Delacroix, teksaĵoj de princo de Créqui kaj kolektoj de porcelano. Krome la muzeo posedas kolektojn de la antikva arto kaj de numismatoj. El teretaĝa koridoro oni povas aliri al kapelo de sankta Johano el Kęty, rektoro de Jagelona Universitato. Restaĵojn de lia renesanca tomboŝtono oni transportis tien de preĝejo al Sankta Anna. La tabulo sur la vando memorigas restadon de la Sankta Patro Johano Paŭlo la Dua en ĉi domo, en 1983 j.

Krakova Societo ESPERANTO

La programo de la renkontoj septembre kaj oktobre 2014 j.

18. 09. – **Konversacio. Postlibertempaj impresoj**

25. 09. – Alicja Sacha. **Nupto en Teksaso**

2. 10. – Grażyna Porada. **La esperantaj lingvaj ludoj**

9. 10. – Lidia Ligeża. **La plej novaj esperantaj tradukoj**

16. 10. – Andrzej Feuer. **La plej novaj mnemoteknikaj versaĵetoj**

23. 10. – Stanisława Szostak. **Somera restado en Busko-Zdrój**